
# la Espero





**LA ESPERO**
SVENSKA
ESPERANTOTIDNINGEN
**APRIL 1977**

FONDITA EN 1913
ISSN 0014-0694


**3**









# JES & NE

## Världskongress i Stockholm 1980?

Stockholms Esperantoförening har anmält till UEA, Värdsesperantoförbundet, att den kan tänka sig att ordna 1980 års världskongress.

Enligt uppgift från UEA har två andra städer redan tidigare anmält sitt intresse. Utsikten att det blir Stockholm som 1980 kommer att anordna en världskongress, är dock ganska stor, trots att Sverige inte tillhör de billigaste turistländerna.

1978 kommer världskongressen att äga rum i Bulgarien, året efter i Schweiz.

Sverige har hittills haft bara två världskongresser: 1934 i Stockholm, med 2042 deltagare, och 1948 i Malmö med 1761.

Andra internationella organisationer har dock oftare förlagt sina kongresser till Sverige, inte minst under senare år: 1975 KELI, 1976 IFEF och SAT.

Att det blir en kraftansträngning inte bara för Stockholm, utan för hela SEF, är självklart. Om UEA fastnar för Stockholm 1980, kommer den kongressen säkert bli minnesvärd. Liksom de andra två som ägt rum i Sverige.

## Några nyheter för informatörer

Det har kommit fram några nya trycksaker, och några gamla trycksaker i ny tappning.

Det nya är två mindre affischer, eller rättare sagt en ny affisch i två olika format. Den har varit avviserad i några månader och nu är den klar. Den är tryckt i två färger (grönt och svart på starkt gult papper) och är tänkt att användas av föreningar som vill meddela något om sin verksamhet på de anslagstavlor som finns runt om i städerna. Därför finns det en tom ruta på affischen som man kan fylla i.

Affischen finns i A4 och A3 format (ungefär 21x30, resp. 30x42 cm). Den säljs av Esperantoförbundet. För 20 A4 affischer betalar man 10 kronor, för 10 A3 affischer lika mycket. Portot är redan inräknat i det.




En «gammal» broschyr har fått lite förändrat utseende (bara lite grann), den s.k. «gröna» broschyren, som är nu ute i en tredje upplaga. Likaså omtryckt är en A4 affisch med lite text om esperanto; och två små blad som man kan bifoga sina brev.

Tyvärr har dessa i skrivandes stund ännu inte kommit från tryckeriet, så vi kan inte visa dem i bild. Din klubb kommer att få några exemplar när de blir färdiga.




**I rutan kan du skriva ett kort meddelande**

## SEJU har årsmöte i Göteborg

SEJU har årsmöte i Göteborg den 23 och 24 april. Förutom själva årsmötet blir det förstås en hel del diskussioner och mera trevliga stunder.

Bland sina medlemmar har SEJU ordnat en enkät som vill ta reda på deras inställning till esperanto och om deras språkkunskaper mm. Vi hoppas att få en redogörelse för resultatet så småningom.

## Utbyte av information

Sveriges Världsfederalister har sänt ut en av våra broschyrer om esperanto till sina medlemmar. I gengäld skickar Esperantoförbundet ut deras broschyr till sina klubbar, som bilaga till senaste *Klubbinfo*. Några föreningar har också sänt ut en upplaga till sina föreningsmeddelanden.

Om du undrat varför du har fått den, så vet du det nu.

## Nästa La Espero utkommer i juni

Nästa nummer av *La Espero* utkommer lite senare än planerat. Vi vill nämligen redan under våren kunna informera om Falköpingskongressen. Nummer 4 kommer alltså i juni. På så vis blir det en kortare paus till nästa nummer, 5, som kommer i början av september.

## La Suda distrikto jarkunvenis en Ystad

La Suda distrikto de SEF havis sian jarkunvenon la 20-an de marto en Ystad, sub la gvidado de la prezidanto Olle Olsson.

Ĉeestis reprezentantoj por 9 kluboj.

En la jarraporto de la Distrikto oni povis legi, ke okazis kursoj en sep diversaj lokoj; ke estis montrujo ĉe la Skania foiro; ke okazis informaj vesperoj en gejunula domo en Helsingborg kaj en la bibliotekoj de Malmö kaj Lund.

Dum la vintraj ferioj okazis kurseto pri esperanto por lernejanoj en Lund. La klubo de Ljungby surgluis informojn pri esperanto en vojaĝbroŝuron de SJ.

Okazis ankaŭ elektoj. Prezidanto estas Olle Olsson, vicprezidanto Gunnar Tengling, sekretarias Lisbet Andreasson'kun Elly Persson, vicsekretario. Ove Krantz estas kasisto, Karin Strandberg estas studgvidanto kaj Gösta Ljunggren membro de la estraro.

La 30-an de aprilo kaj 1-an de majo la Distrikto aranĝos semajnfinan kurson en Lunnahöja apud Hässleholm. Tie prelegos Victor Sadler el Rotterdam.

La postlunĉa programo temis pri Islando. Bertil Andreasson per bildoj kaj vortoj prezentis la insulon. Ester Andrén donis informojn pri la venonta Universala Kongreso en Reykjavik.

## Faka revuo por juristoj




*Internacia Jura Revuo* estas unu el la bonkvalitaj fakrevuoj en esperanto. Kutime ĝi ne tro ofte aperas, sed ĉijare atingis nin jam du kajeroj: unu por 1976 kaj unu por 1977. Ambaŭ estas je po 48 paĝoj kaj enhavas aron da artikoloj, interesaj ankaŭ por nejuristo. Pluraj artikoloj en numero 2/76 pritraktas la demandon pri kompenso pro damaĝoj kaŭzitaj per akcidentoj en diversaj landoj. Simile oni en la ĉijara kajero komparas la leĝojn rilate al la rajto havi domon en diversaj landoj.

Krom tio aperas pli ampleksaj artikoloj pri aliaj juraj demandoj.

La revuon redaktas Ivo Lapenna. Oni povas aboni al ĝi ĉe dro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio, por 120 aŭstraj ŝilingoj.

Eldona Societo certe povas helpi vin aranĝi abonon.

★★★★★★★★★★★★★

## La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
*Adress:* Fack, 122 04 Stockholm-Enskede
*Ansv. utgivare:* Bertil Åkerberg
*Redaktör:* Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping
*Telefon:* 0510 - 286 42 (arb. 0510 - 221 30)
*I redaktionen:* Anita Lindblom, Franko Luin, Geoffrey Sutton
*Prenumeration:* 30 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Svenska Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med 8 nr per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.
*Manusstopp:* den 10, månaden före utgivningsmånaden
*Fotosats:* Esperantoförbundet
*Tryck:* Sturetryckeriet, Stockholm 1977

★★★★★★★★★★★★★

## Esperantoförbundet

*Postadress:* Fack, 122 04 Stockholm-Enskede
*Besöksadress:* Hägervägen 31
*Telefon:* 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.
*Postgiro:* 20 12 - 3
*Medlemsavgift:* direktansluten medlem 30 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 15 kronor, familjemedlem utan tidning 10 kronor
Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.

★★★★★★★★★★★★★

## Esperantoförlaget

*Postadress:* Fack, 200 42 Malmö
*Besöksadress:* Möllevångsgatan 20 B
*Öppettider:* 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.
*Telefon:* 040 - 12 20 29
*Postgiro:* 578 - 5
*Expedition:* Anna-Greta Strönne
*Medhjälpare:* Wivi Nilsson
*Styrelsens ordförande:* Åke Blomberg

## La Suda distrikto malŝatis «Gevänner!»

La suda distrikto de SEF jarkunsidis en Ystad en marto, kaj decidis fari la jenan deklaron:

«Kiam oni pro ekonomiaj kaŭzoj estas devigata malnombrigi la paĝojn en *La Espero* kiel en la plej malfrua numero, estas grave ke la enhavo estos serioza kaj esenca. Pro tio estas tre nekontentige trovi artikoleton, Gevänner kiel sur la lasta paĝo. La gazeto estas oficiala organo de SEF kaj sin turnas kaj al esperantistoj, svedaj kaj eksterlandaj, kaj al svedoj neesperantistaj. Do estas necese uzi aŭ esperanton aŭ svedan lingvon, sed ne tia fimiksaĵo kiel en la nomita Gevänner. Tia lingvo estas nekomprenebla kaj por eksterlandaj esperantistoj kaj por svedoj neesperantistaj. Ni deziras pli bonan stilon en la estonteco».



## Ilustrita broŝuro pri ĉeĥa urbo

Se vi sendas du respondkuponojn kaj vian adreson al Jiři Piŝtora, nám. Miru 1746, CS-560 02 Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio, vi ricevos ilustritan, 24-paĝan broŝuron pri tiu urbo.

## Kaj por fini jen anekdoto

Por tiu ĉi numero de *La Espero* ne atingis nin iu limeriko. Do ni finu per anekdoto sendita de Jan-Olof Svensson el Tidaholm.

S-ro Svensson, kiu dum longa tempo oferis sian tutan libertempon por konstruo de vilao, iun matenon telefonis al sia laborejo por deklari sin nekapabla labori.

—Hieraŭ ni festenis la tegmentadon de mia vilao kaj hodiaŭ mi devas resti en la lito.

—Ĉu tro multe da brando?

—Certe jes. Mi iris sur la balkonon por ricevi iom da freŝa aero.

—Jes...?

—Ĝi ankoraŭ ne estas konstruita.

# HODIAŬ

## Kion konkretan ni povas proponi?

*Se iun tagon parlamentano, al kiu vi informis pri esperanto, subite diras: «Bone, via ideo pri internacia lingvo estas alloga al mi. Kion vi volas, ke mi faru por helpi al vi?», kion vi respondas?*

*Li povas proponi ion en la parlamento kaj eble ricevi apogon de kelkaj aliaj parlamentanoj. Vi scias, ke la propono devas esti tute konkreta, realisma, politike ne tro kompromitiga, por ke li entute povu pripensi ĝin. Kio ĝi estu?*

*Ni povas facile respondi al la demando, kion ni deziras. Ni deziras la enkondukon de esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj en la mondo. Ni deziras, ke ĝi ludu la rolon de sola lingvo por ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj. Sed tio ĉi ne estas konkreta, realisma propono, kiun iu parlamentano povus hodiaŭ iniciati en la parlamento.*

*Ni deziras havi esperanton en la lernejoj — sed ni ĉiuj scias, kiom nerealisme estas kredi, ke tio okazos de hodiaŭ al morgaŭ. Ankaŭ parlamentano opinius tion nerealisma.*

*Kio estus do realisma propono? La estraro de SEF dum sia lasta kunsido dediĉis kelkajn horojn al diskuto pri ĉi tiu demando. Ĝi venis al kelkaj konkludoj, almenaŭ parte realismaj, sed devas ekzisti pli da ili.*

*Ni ne menciu, kion la estraro pensis. Ni preferas ricevi kontribuaĵojn de vi, ĉar la demando estas tiom grava kaj tiom aktuala, ke ĝi devas interesi ĉiujn esperantistojn en Svedio, ne nur la estraron de SEF.*

*Skribu al* La Espero *pri viaj ideoj, sed memoru, ke devas temi pri tiom konkretaj kaj tiom realigeblaj ideoj, ke parlamentano kuraĝus prezenti ilin kiel siaj en la parlamento. Kaj ne forgesu, ke tiu via parlamentano ne estas iu Einar Dahl, kiu fieras esti esperantisto, sed kiu ajn, al kiu esperanto estas nur unu el multaj ideoj, ankaŭ se li post via konvinkado opinias ĝin bona.*

Franko Luin

SVEDA ESPERANTO KONGRESO

FALKÖPING 28-30/5 '77

SVEDA ESPERANTO KONGRESO

FALKÖPING 28-30/5 '77

# Falköping: kelkaj praktikaj informoj

## Kie estas kio?

**Stora hotellet** estas la kongresejo. Ĝi situas centre en Falköping, en S:t Olofsgatan 26.

De la stacidomo estas 10 minutoj da promeno al Stora hotellet. Se vi venas per aŭtomobilo, demandu pri la vojo, kaj vi rimarkos, ke ĉiuj scias, kie estas tiu hotelo.

Falbygdens museum situas proksime de la hotelo.

**Junulargastejo** (vandrarhemmet) situas bele en Mössebergsparken, kelkajn kilometrojn for de la kongresejo.

**Bredablick** estas restoracio ĉ. 2 km for de Falköping. Post la ekskurso estos vespermanĝo en Bredablick. Tiuj, kiuj ne volos veturi per la ekskursaj aŭtobusoj al Falköping post la vespermanĝo, povos resti pli longe kaj promeni reen.

## Kiom kostas?

**Pakaĵo 1:** unulita ĉambro 270,-
**Pakaĵo 2:** dulita ĉambro, po persono 230,-
**Pakaĵo 3:** junulargastejo 190,-

SEJU-membro havas rabaton je 15,- je la pakaĵoprezoj.

**Aliĝu tuj!**
Sendu la monon al *poŝtĝira konto de Falköpings Esperantoklubb: 66 78 61-9* plej laste la *30-an de aprilo*.

Plej simple estas uzi la pagilon, kiun vi ricevis en *La Espero* nro 2. Sed ankaŭ ordinara poŝtĝira pagilo taŭgas.

**Aliaj prezoj**
Se vi ne povas preni unu el la pakaĵoj, vi povas pagi laŭ la jenaj prezoj — nur indiku kiun tagon vi alvenos kaj foriros:

| | |
|---|---|
| unulita ĉambro po nokto | 60,- |
| dulita ĉambro po nokto k persono | 40,- |
| junulargastejo po nokto | 20,- |
| unu matenmanĝo | 11,- |
| dimanĉa lunĉo | 17,- ✓ |
| ĝisrevida lunĉo | 30,- ✓ |
| ekskurso kun vespermanĝo | 52,- ✓ |
| kongreskotizo | 30,- ✓ |
| kongreskotizo por SEJU-membro | 15,- |

**Programo por sabato, 28a de majo**

13 00 Estrarkunsido
14 00 **Akceptejo malfermiĝas** en Stora hotellet, Falköping
15 00 **Bonvensalutoj**, kaj poste **Lennart Åberg: «Praktikado konvinkas»** Enkonduko kaj grupdiskutoj
17 30 Instruistoj kunvenas
19 00 **Festa bankedo** La urbo Falköping regalas

**Programo por dimanĉo, la 29a de majo**

08 15 Matenmanĝo
09 00 **Jarkunveno de SEF** En Stora hotellet
12 00 Lunĉo
13 30 **Ekskurso** per aŭtobusoj, kiuj startas ekster la hotelo. Haltoj en Karleby, Åsle tå; diservo en Kungslena, vespermanĝo ĉ. 18 00 en Bredablick.

**Programo por lundo, la 30a de majo**

08 15 Matenmanĝo
09 00 Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto
10 00 **Resumo de la grupdiskutoj**
11 30 Ĝisrevida lunĉo

SVEDA ESPERANTO KONGRESO

FALKÖPING 28-30/5 '77

62-a Universala Kongreso de Esperanto Reykjavik 30.7 — 6.8 '77

Partoprenu la karavanon de Sveda Esperanto-Federacio al la lando de fajro kaj glacio. Petu informojn ĉe s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27d, 217 53 Malmö

Jen eble via sola ebleco viziti Islandon, proksima, sed tiel longe for de la kutimaj turismaj vojoj...

Islando

# Esploras aperigon de novaj verkoj

La agadon de Eldona Societo Esperanto ankoraŭ limigas la projekto pri eldono de nova sved-esperanta vortaro. Tiu projekto postulos grandan kapitalon kaj devigas la estraron esti singarda pri aliaj eldonoj.

Por plej favore utiligi la kapitalon kolektitan por la vortaro, donacoj de la sveda esperantistaro, kiujn kolektis SEF, oni interkonsentis altigi la kooperativan kapitalon de la Eldonejo, tiel ke la tuta sumo kolektita, 65 000 kronoj, altigas la SEF-parton de la kapitalo. [En 1977 aldoniĝos ankoraŭ 8 000 ĝis 9 000 kronoj ankoraŭ ne transdonitaj al la Eldonejo.] Pro kondiĉo en la statuto pri limigita voĉdonrajto, tiu aranĝo ne donas al SEF pli da voĉoj ol ĝi jam pli frue posedis. La kooperativa kapitalo atingis per tio la sumon de kr. 100 820.

La rezulto por 1976 montras deficiton je kr. 99:31. Tio estas per si mem tute sensignifa, ĉar la celo de la Eldonejo ne estas montri profiton, sed financi eldonadon de verkoj, dezirataj kaj bezonataj de la esperantistaro. La deficiton kaŭzis, cetere, la librotenitaj deprezoj (valormalpliigo) de la kompostmaŝino en Stokholmo, je 3 400 kr. Ĉar tiu maŝino, aĉetita antaŭ ĉio por malpliigi la kostojn por la vortaro, kostis 40 000 kronojn, ni verŝajne ne montros profiton dum la proksimaj jaroj.

Pli malagrable estas, ke la sumo de la vendado dum 1976 atingis nur kr. 32 649 (sen varimposto), kompare al 37 890 en 1975. Parte kulpas la malbona vendado je la kongreso de SEF en Skellefteå, sed parte certe la fakto, ke dum pluraj jaroj ne aperis iuj noveldonaĵoj. La estraro serioze diskutis tiun problemon je kunsido en Malmö komence de marto, kaj decidis esplori la eblecojn aperigi iujn novajn verkojn en proksima tempo, malgraŭ la koncentriĝo je la nova vortaro.

La ekspedejon en Malmö prizorgis Anna-Greta Strönne kun helpo de Wivi Nilsson. Iliaj salajroj por tiu, kelkfoje certe tre peniga laboro, eĉ ne atingas la proksimecon de la minimumaj salajroj por simila laboro en Svedio. Ili sekve laboras ĉefe idealisme. La estraranoj ricevis neniun rekompencon.

Pri la nova vortaro oni povas raporti ke Ebbe Vilborg jam pretigis pli ol la duonon de la manuskripto. Pro teknikaj kaŭzoj la komposta laboro malfruiĝis (kiel vi povis rimarki el *La Espero*), sed ĝi pluiros intense dum la someraj monatoj.

**Åke Blomberg**


**HÖG TID!**

**KONGRESSAVGIFTER**
**Reykjavik 1977**
Gäller till 20 juni 1977

| | |
|---|---|
| 1. Icke-medlem i UEA | 337,- |
| 2. Medlem med årsbok | 303.- |
| 3. Medlem med årsbok och "esperanto" | 252,- |
| 4. Make/maka till (1) | 237,- |
| 5. Make/maka till (2) eller (3) | 213,- |
| 6. Ungdom t o m 20 år | 102,- |
| 7. Universitetsstuderande t o m 30 år | 169,- |
| 8. Synskadad | 136,- |


**KALL ELSE:**

Andelsägarna i
**Förlagsföreningen Esperanto upa**

kallas härmed till ordinarie årsstämma måndagen den 30 maj kl. 09.00 PÅ Stora Hotellet i Falköping.

Ärenden enligt stadgarna, § 14.

Ombud för andelsägande föreningar skall inlämna fullmakt före årsmötets början.

Verksamhetsberättelse med ekonomisk rapport kommer ej att publiceras i *La Espero*, men kan erhållas från Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö, efter beställning.


**SÄNKT PRIS**

Ebbe Vilborg:
**SUPPLEMENT TILL SVENSK ESPERANTISK ORDBOK**

Häftad: 15:— kr

*I väntan på den nya ordboken — som dröjer än en tid — måste du absolut ha tillgång till supplementet, som innehåller nya ord och andra kompletteringar, föranledda av språkbrukets förändringar sedan den gamla ordboken gavs ut*

Priset gäller bara för omgående beställning från
ESPERANTOFÖRLAGET

Esperantoförlaget



# Res i sommar!

Även i år kommer några hundra olika esperanto-arrangemang att äga rum överallt i världen. Listan över ett urval av dessa har vi tagit från marsnumret av tidskriften *esperanto*. Vi har tagit med bara de arrangemang som är planerade för månaderna juli, augusti och september.

Denna lista är, som sagt, ett urval. Men redan detta urval är så omfattande, att det blir svårt att välja bland allt som bjuds.

Varför ska man till ett esperanto-arrangemang under sommaren?

För att det behövs. Man behöver putsa lite sina kunskaper, som blivit lite rostiga under vintern, särskilt om man inte hunnit med en kurs eller om man inte haft tid att besöka klubbens möten.

Vilket man ska välja är en smaksak. Det finns i denna lista rena semester-arrangemang där esperanto-inslaget troligen är ganska liten — men det finns också andra där esperanto är helt dominerande, från Universala Kongreso till olika kursveckor. Du vet själv, vad som är bäst för dina kunskaper och dina intressen.

# Elektu inter ili

**Julio**

| | |
|---|---|
| 01-10 | E-ista Lingva Tendaro, Szolnok, Hungario (TK de HEA, Pf.11, H-5601 Szolnok) |
| 03-09 | 15a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (TIT-SEU, 48-as tér 11, H-5701 Gyula) |
| 03-23 | Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Francio (Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé) |
| 09-16 | Laborferia Semajno, Oldenzijl, Nederlando (''Helpu unu la Alian'', 't Bolhuis, NL-8222 Oldenzijl) |
| 09-17 | Int. Studsemajno, Vääksy, Finnlando (IsCe, SF-17 300 Vääksy) |
| 10-19 | 10a IREN, Abaliget, Hungario (TK de HEA, Pf.2, H-6701 Pécs) |
| 10-03/8 | 2a Int. E-Laborbrigado, Turkeve, Hungario (L. Fölvari, Árpád u. 11, H-5420 Turkeve) |
| 11 | Int. Virina Renkonto, Budapest, Hungario (Virina Komitato de HEA, Pf.193, H-1368 Budapest) |
| 13-17 | Internacia Medicinista E-Konferenco, Krakovo, Pollando (V. Opaka, U1. Grzegórzecka 20, PL-31-531 Krakovo) |
| 14-18 | 12a Seminario de Eo, Santos, Brazilo (D-ro B. Cosenza, Caixa Postal 3881, Rio de Janeiro, G.B. ZC-00) |
| 14-27 | 11a Int. Konferenco de ILEI, Luksemburgo, Luksemburgo (D-ro M. Dazzini, Cas. Post. 22, I-54100 Massa C.,Italio) |
| 20-24 | 37a Hispana E-Kongreso, Sabadell (G-ral Mola 99, Sabadell, Barc.) |
| 23-30 | KELI-Kongreso, Edinburgh, Skotlando (T. Neil, 18 Glencaple Ave., Dumfries, DG1 4SJ) |
| 24-28 | 25a Kongreso de ELNA, Washington DC (ELNA, p/a E.J. Lieberman, 6451 Barnaby St., N.W., Washington DC 20015) |
| 24-30 | Int. Feriaj E-Kursoj (sub aŭspicio de UEA), Helsingör, Danlando (Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingör) |
| 24-13/8 | Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Francio (Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé) |
| 26 | 90-jara jubileo de Esperanto; la Unua Libro aperis en 1887. |
| 26-29 | Oficiala Antaŭkongreso de la 62a UK, Stirling, Skotlando (W. Auld, 20 Harviestoun Rd., Dollar, FK14 7HG) |
| 27-04/8 | SEL-tendaro, Bregenz, Aŭstrio (F. Schwärtzler, Rathausgasse 2, A-6900 Bregenz) |
| 30-05/8 | 50a SAT-Kongreso, Aŭgsburgo, FR Germanio (H. Schmid, Alte Reichsstr. 31f, D-8901 Steppach) |
| 30-06/8 | 62a Universala Kongreso de Eo, Rejkjaviko, Islando (UEA; LKK, Pósthólf 1081, Reykjavík) |

**Aŭgusto**

| | |
|---|---|
| 07-11 | Oficialaj postkongresaj ekskursoj de la 62a UK (UEA; LKK, Pósthólf 1081, Reykjavík, Islando) |
| 07-14 | 23a Int. E-Ferio-Semajno, Krommenie, Nederlando (S-ino B.v.d. Pol, Teresjkovastr. 15, Krommenie) |
| 09-16 | 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Poitiers, Francio (JEFO, 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris) |
| 14-03/9 | Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Francio (Kulturdomo Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé) |
| 16-21 | 6a Varia Int. Semajno, Budapest-Szeged, Hungario (BTK, Pf. 153, H-1443 Budapest) |
| 17-21 | 37a Kongreso de IKUE, Częstochowa, Pollando (S. Ruchula, U1. J.Krasickiego 6, PL-33-100 Tarnow) |
| 27-28 | 64a Kongreso de Japanaj E-istoj, Tokio (JEI, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio) |

**Septembro**

| | |
|---|---|
| 02-10 | 48a Itala Kongreso de Eo, Campobasso (Ente Provenciale per il Turismo, Piazza Vittoria 14, I-86100 Campobasso) |
| 03-16 | 13a Int. E-Feriado, ''Ora Pola Aŭtuno'', Międzygórze, Pollando (PEA, ul. Dubois 3, Wrocław 17) |
| 04-10 | 18a Eŭropa Ferio-Semajno en Svislando, Wengen, Svislando (E. Glättli, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg) |
| 16-18 | Trilanda E-Konferenco, Gorizia, Italio (S-ino M. di Maso, V. Michelstaedter 11, I-34170 Gorizia) |
| 17-18 | 19a Kataluna E-ista Renkontiĝo, Cornellá, Hispanio (L. Serrana-Pérez, General Mola 99, 470, Sabadell, Barc.) |
| 30-02/10 | 10a Kultura Semajnfino, Blieskastel-Niederwürzbach, FR Germanio (SEL, Fr.-Schubert-str. 26, D-6602 Dudweiler) |
| 30-02/10 | Skota Aŭtuna Semajnfino, Gean House, Skotlando (J. Coogans, ''Glencairn'', 9 Cairns Rd., Bishopton PA7 5EH) |

# Helsingør

En la Internacia Altlernejo, Helsingør, Danlando, okazos internaciaj feriaj esperanto-kursoj la 24-an ĝis la 30-an de julio 77. Ni invitas vin ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en vere internacia rondo.

Atentinda estas la fakto, ke la eminenta kaj en la esperantistaj rondoj tre bone konata s-ro Reto Rossetti gvidos la perfektigan kurson. La ceterajn tri kursojn gvidos la samaj instruantoj kiel pasintjare. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektiĝi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe

s-ino Eva Langkilde
Ingemannsvej 18,
DK-3000 Helsingør

# Tidningar: bevaka och reagera

Om du tycker att det är viktigt att utvidga förbundets informationsverksamhet och du skulle vara beredd att skriva, till exempel, två korta insändare under loppet av ett år för att hjälpa till med detta, läs vidare! Du kan välja vad du vill göra och du behöver ändå inte känna dig på något sätt bunden.

* Välj vad du vill göra ur följande tre kategorier: en, två eller gärna alla tre!

**1** *Observanto* skickar omgående till SEF artiklar ur valda tidningar och tidskrifter, dvs *alla* artiklar om esperanto och andra som handlar om närliggande saker, där ett svar eller påpekande om esperanto vore lämpligt. På varje insänt klipp ska tidningens namn, utgivningsdatum och ditt namn skrivas. Du behöver inte skicka hela tidningen, utan bara klippen.

**2** *Leterskribanto* skriver insändare *både* på eget initiativ och när ombedd av SEF. (Du kan naturligtvis alltid säga nej, om du blir tillfälligt hindrad.)

**3** *Artikolverkanto* skriver artiklar både på eget initiativ och när ombedd av SEF. Troligen blir det högst en gång om året och naturligtvis med hänsyn till dina egna intressen. Dessutom brukar man få betalt för antagna artiklar.

* Skriv kategorien eller kategorierna du väljer på ett kort och sänd till SEF tillsammans med namn, adress, telefonnummer, yrke, intressen och namnen på de tidningar och tidskrifter du brukar läsa.

* Vi kommer att meddela dig vilka tidningar du borde koncentrera dig på.

Postadressen är: Esperantoförbundet, «Gazetaro», Fack, 122 04 Stockholm-Enskede, men mycket kommer att skötas per telefon — snabbt och effektivt. Ring mig personligen om du har en fråga — på svenska eller esperanto 018-130105.

**Geoffrey (Ĝefri) Sutton**

# Forpasis

Atingis nin lastatempe informoj pri la forpaso de pluraj konataj geesperantistoj.

Jam en februaro mortis **Eugenia Morariu**, 73-jara. Ŝi lernis esperanton kun sia frato Tiberio en 1921 kaj ŝi restis fidela al esperanto la tutan vivon. Ŝi estas speciale konata pro siaj artaj tradukoj el la rumana literaturo, multaj el kiuj aperis ankaŭ en *La Espero*.

Fine de la antaŭa jaro forpasis en Hallsberg **G. A. Fritzell**, vera idealisto. Li estis dum multaj jaroj prezidanto de la esperanto-klubo de Hallsberg; kun lia morto finiĝis epoko de tiu klubo.

En Lidköping mortis la 6-an de marto **John Widén**, 75-jara. Ĝis siaj lastaj tagoj li restis fidela al la klubo kaj apartenis al la estraro.

Dum pli ol 20 jaroj li estis ĉefprizorganto de la Arkivejo de la Popolorganizaĵoj en Lidköping, en kies kadro li kreis konsiderindan esperantan arkivon.

John Widén estis sincera idealisto, unu el tiuj rimarkindaj personecoj, kiujn edukis la popolorganizaĵoj kaj la laborista movado de la antaŭmilitaj jaroj.

En Budapeŝto mortis **Paŭlo Balkanyi**, konata veterano hungara. Li apartenis al tiuj tre aktivaj hungaroj, kiuj praktike helpis al la literatura agado de Kolomano Kalocsay kaj la aliaj granduloj de la «hungara skolo». Li mem verkis pli ol mil esperantajn artikolojn, kelkaj el kiuj siatempe aperis en *La Espero*.

# ANONCETOJ

**17-jara finna** gimnazianino serĉas praktiklaboron ĉe sveda familio por ĝis unu monato (4 julio ĝis 7 aŭgusto). Bv. skribi al f-ino Anne Järvinen, Lähdekorvenk. 4, SF-33820 Tampere 82, Finnlando.

**Mezaĝa bulgaro**, kiu kun sia edzino deziras — por la dua fojo — viziti Svedlandon, serĉas kontakton kun ankoraŭ unu-du esperantistoj, kiuj povus lin gastigi dum kelkaj tagoj (li jam havas unu kontaktanton). Li pretas fari la saman servon al svedaj esperantistoj vizitantaj Bulgarion. Skribu al Dimitar Kolev, str. Miladinovi 1, Dimitrovgrad, Bulgario.

**Rumana profesoro** entreprenas esploron pri la strukturo de la prozliteratura vortaro de esperanto. Li deziras verkaĵojn el la sveda literaturo (prozajn) aperintaj post la dua mondmilito. Prof. d-ro Aurel Boia, str. Giulesti 42, Cásuta postala 2524, Bucuresti 17, Rumanio.

**Pluraj francaj** geesperantistoj (instruistoj, studentoj) deziras korespondi. Skribu indikante vian aĝon, profesion, interesojn, al Emile Thomas, 18, rue de l'Iroise, F-292 00 Brest, Francio.

**Korespondi deziras:**

Marc Blondeel, 22 rue Claude Debussy, F-59130 Cambersart, Francio

Adam Konina, mezlerneja abituriento, str. Dabrowski 6, PL-42-730 Koszecin, Pollando

Krzysztof Golonka kaj Zbigniew Zielonka, studentoj de matematiko, str. Mewy 18/6, PL-44-100 Gliwice, Pollando

23-jara Hegyi Sándor, Virág u. 1, H-5400 Mezötúr, Hungario

21-jara Ján Števák, Leninova 18/2, CS-971 01 Prievidza, Ĉeĥoslovakio

Dante Soto Cannata, junulo, Calle Dante 679, Lima 34, Peruo

58-jara Heinz Siegel, Dammstrasse 49 C, DDR-92 Freiberg, Germana Demokrata Respubliko

21-jara Rafael Serrano R., Kesto aerpoŝta 27953, Bogotá, Kolombio

**Du rondoj** volas kunlabori kun ĉiuj kiuj kolektas poŝtmarkojn, flagetojn, bildkartojn kaj librojn.

Juvelo de maro, Diamentowa 6, PL-80-028 Gdańsk, Pollando

Ĉe la maro, Ŝlaska 66 B, PL-80-389 Gdańsk, Pollando.

Konstrui per
YTONG®
estas konstrui
ekonomie
brulsekure
YTONG AB
YXHULT GRUPPEN

# La jarraporto de SEF: raporto pri tutlanda agado



**Jan Strönne**

Legado de jarraporto ĉiam prezentas kelkajn surprizojn. Kvankam oni tagon post tago sekvis la agadon de la organizaĵo, oni havas malofte trarigardon pri ĉio, kio okazis dum la jaro. Nur jarraporto montras la amplekson (aŭ malamplekson) de la agado, kiun oni jam rigardas iom perspektive, for de la ĉiutagaj zorgoj.



**Märtha Andréasson kaj Sven Alexandersson**

Ĵus aperis la jarraporto pri la agado de SEF dum 1976. Ĝin ricevis, kiel kutime, ĉiuj kluboj, kaj ĝi estos havebla al ĉiuj, kiuj partoprenos la jarkongreson de SEF en Falköping.

Kvankam estas malfacile en tiu ĉi jarraporto trovi ion, kion oni povus nomi «elstara agado», la jarraporto montras, ke SEF estas forta kaj aktiva organizo. Imponas, kiel ĉiam, la amplekso de la agado de la kluboj, speciale se oni konscias pri la malfacilaĵoj, kiujn preskaŭ ĉiuj el ili havas.

**Elstarigita de UEA**

En 1976 SEF ricevis novan premion de UEA, «Pokalon Fyne», kiel plej aktiva esperanto-organizaĵo. Ne estas nia tasko prijuĝi, ĉu tiel estas, sed nur kun danko konstati, ke oni rimarkis la klopodojn, kiujn ni faras en Svedio por disvastigi la lingvon de Zamenhof. Niaj klopodoj ne restis senrezultaj, ĉar denove SEF povis registri etan kreskon de la membronombro. Ni estas nun pli ol 1700 esperantistoj organizitaj en SEF. Ni bezonas fariĝi pli, kaj ni povas.

Alia signo pri plifortiĝo estas, ke la bulteno *Esperantonytt* nun iras ankaŭ al ĉiuj membroj, kaj ke *La Espero* ekde 1977 aperas pli ofte, per ok numeroj po jaro.


**Sukcesa monkolekto**

Tre kontentige evoluis la monkolekto por nova sveda-esperanta vortaro, kiu atingis ĉirkaŭ 74 000 kronoj. Plejparto de la mono jam estas transdonita al Eldona Societo Esperanto, kiu eldonos la vortaron. Por parto de tiu mono la eldonejo aĉetis fotokompostan maŝinaron, kiu malmultekostigos la preskostojn. Ankaŭ SEF utiligas tiujn maŝinojn, i a por kompostado de *La Espero*. Post la livero de esperantaj tipoj la kompostaĵo fariĝis profesie aspekta.

Kune kun Eldona SEF planis serion da svedlingvaj informaj kajeroj pri esperanto, el kiuj kelkaj aperos en 1977. Planataj estas kajeroj pri bazaj faktoj pri esperanto, pri la esperanta literaturo, pri la sistema gramatiko de esperanto kaj aliaj. Per eldono de ĉi tiuj kajeroj ni povos pli facile ol ĝis nun montri al la kultura valoro de esperanto kaj la atingoj de la esperanto-movado.

**La jarkongreso**

La jarkongreso de SEF, kiu okazis en Skellefteå, ne apartenis al la pli grandaj, ĉefe pro la granda distanco kaj la ioma improviziteco. Sed ĝi ne estis malgrava, ĉar dum ĝi oni akceptis novan statuton de SEF. Por la reeĥoj rilate al esperanto zorgis la vere granda IFEF-kongreso, kiu okazis en Skellefteå samtempe.



**Bertil Åkerberg**
**Fotis Ulla Luin en la oficejo de SEF**

**La ekonomio**

Aktiva organizo malofte povas montri profiton, ĉar oni foruzas la monon por diversaj aktivecoj. Se oni rigardas la ciferojn en la ekonomia raporto de SEF, oni povas tamen rimarki, ke ĝi ne montras perdon. Tiu «malperdo» estas nur ŝajna, ĉar la organizo devis uzi pli ol 10 000 kr da donacoj por povi balancigi siajn kostojn kun la enspezoj. La daŭra inflacio — kaj por 1977 oni antaŭvidas, ke ĝi estos pli granda ol dum la lastaj jaroj — kaŭzas rapidan kreskon de la bazaj kostoj, kiujn SEF ne povas eviti (luo, afranko, preskostoj k a). Kiel konate, SEF ne havas dungitojn, tial ankaŭ ne kostojn por salajroj.



**Åke Blomberg**

**Multaj kunlaborantoj**

Grandan parton de la laboro faras la estraranoj kaj dekoj da aliaj membroj. Aldone al ĉi tiu artikolo vi trovos kelkajn fotojn de tiuj, kiuj kunhelpas kuntiri la boaton. Nur kelkajn, ĉar por ĉiuj ni ne povus trovi lokon; kaj ankaŭ ĉar de tre multaj ni ne havas bildojn. Sed vi certe konas iliajn nomojn.

**Franko Luin**